# EKO 2025

Irane Teherane

EKO 2025-22. Majo 22. Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Sen alkroĉaĵo: Sume 300 KB


## La 12-a Irana Esperanto-Kongreso

Aŭdeblis inaŭguraj salutmesaĝoj de profesoroj **Duncan Charters, Probal Dasgupta** kaj **Seán Ó Riain**. Jen la programo de la Kongreso kune kun preleg-priskriboj kaj biografioj de la prelegantoj: https://www.espero.ir/eo/irek-12/

En Eventa Servo ĉiu preleg(ant)o estas aparte prezentita: https://eventaservo.org/

Ahmad Mamduhi

## Korea kunvenado en vendredoj



Seula Esperanto-Kulturcentro havas regulan 90-minutan *zoom*-renkontiĝon dufoje monate. La 56-a Venzo (Vendreda *Zoomo)* okazos en la 30-a de majo. La temo estas 'Kio okazis ĉe vi aŭ ĉirkaŭ vi dum du semajnoj?' La temo estas simpla, sed temas pri nia ordinara vivo. Iu ajn povas aliĝi eĉ sen sciigo, se li/ŝi parolos en Esperanto. Jen estas zoom-adreso.
**https://us02web.zoom.us/j/85100249337**…
ID: 851 0024 9337; PASKODO: saluton

Lee Jungkee (siatempa kolego de SMG en la Estraro de UEA).

## BrazilaMuziko



Jen traduko farita el la itala lingvo! Ĝin faris la brazilano **James Rezende Piton**. Temas pri Eblas fari (originale *Si può fare*), verkita de **Angelo Branduardi**:

## La Sorobano: pli ol abako - esploro kaj praktiko

Jen la temo de la ĉi-monata prelego en Aŭstralio. En ĉi tiu prezento ni esploros la sorobanon, la japanan abakon, ekde ĝiaj historio, kulturo kaj evoluo, ĝis ĝia baza funkciado, mirindaj kapabl(ig)oj kaj nuntempaj aplikoj. Per ekzemploj kaj ludoj, ni malkovros kiel ĉi tiu miljara ilo daŭre estas uzata kiel eduka kaj mensostimula ilo. La aliro estos dinamika kaj celita veki scivolemon kaj amuzon por ĉiuj.

## Ĉina donaco al ILEI



Hodiaŭ mi ricevis nome de ILEI ceramikan skribilujon realigitan de vilaĝa metiisto en Shandong, laŭ ideo de S-ro Semio. La bela ujo montras la vizaĝojn de Zamenhof kaj de tri klasikaj ĉinaj filozofoj. Ĝi eniros en la pretiĝantan Homan Ĉenon, kiu espereble baldaŭ atingos MIL homojn!

Alessandra Madella

## Vicprezidanta beno por BET 59 en Litovio

La 15-an de majo la unua vicprezidanto de la Litovia parlamento Juozas Olekas akceptis la prezidanton de Litova Esperanto-Asocio, Povilas Jegorovas. Ili priparolis diversajn aspektojn de la organizo de BET-59, kiu okazos ekde la 5-a de julio en Kaŭno, kaj la inviton de la 113-a UK al Kaŭno en la 2028-a jaro. Legu pli en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto*: https://sezonoj.ru/2025/05/litovio-80/

## Familie en la renoma franca kulturcentro

La Renkontiĝo de Esperanto-Familioj (REF) ĉi-jare okazos de la 21-a ĝis la 31-a de julio en la kastelo Greziljono en Francio. Ĉi tiu renkontiĝo celas familiojn, en kiuj la infanoj lernas Esperanton denaske aŭ alimaniere atingis praktike aplikeblan Esperantan lingvokapablon. Ĝi taŭgas ĉefe por infanoj ĝis 14 jaroj kaj iliaj gepatroj. Pro la internacieco de la partoprenantaro ĝi helpas al la infanoj evoluigi sian aktivan lingvoscion.

La partoprenantoj mem organizas diversajn programerojn laŭ siaj interesoj. Tio kutime inkluzivas komunan kantadon de Esperantaj kantoj (ĉefe – sed ne nur – infankantoj), manlaboradon, diversajn ekskursojn, koncertojn de muzikemuloj, internacian vesperon, diskutrondojn pri denaskigo de infanoj kaj rilataj temoj, kaj diversajn aliajn programerojn laŭ la interesoj de la partoprenantoj kaj la ebloj de la ejo.

Ĉi-jare REF okazos en la historia kastelo Greziljono en okcidenta Francio, apud lageto kaj arbaro, proksime al la urbeto Baugé-en-Anjou. Kompare kun aliaj Esperanto-aranĝoj aŭ feri-ebloj en okcidenta Eŭropo, ĝi estas relative malmultkosta. Ni esperas pri pliaj aliĝoj al ĝi. Jen pli da informoj kaj aliĝilo: https://familioj.miraheze.org/wiki/REF_2025

Markos: plusendis Veronika Acsadi el Hungario

## Danube, sendube; balkane, laŭplane

Ligilo por elŝuti video-registraĵon de la lasta Balkan-Danuba Kunlabora virtuala kunveno, okazinta la 17-an de majo, estas: https://1fichier.com/?9mfon0prjdfjgtjivy8t

La venonta Balkan-Danuba kunlabora kunveno okazos en sabato, la 21-an de junio. Mi proponas klaki la ligilon kaj legi pri la Esperanto insulo ĉe Danubo: https://esperantisto.hu/insulo-esperanto/

Gradimir Kragiĉ

## La irana kongreso: 40 prelegoj por vi

La kompleta registraĵo de IrEK-12 nun estas spektebla en la jutuba kanalo de UEA (kun 40 prelegoj):

- La unua tago, la 17-a de majo:
- https://www.youtube.com/watch?v=FIU9qOHXbws
- La dua tago, la 18-a de majo:
- https://www.youtube.com/watch?v=VP0ojNW3fO8

Por vidi la programon de la Kongreso bv. rigardi al https://www.espero.ir/eo/irek-12/ kie legeblas ankaŭ la priskriboj de la prelegoj kaj la biografietoj de la prelegintoj.

Ahmad Mamduhi, prezidanto de ILEI

## AMO-seminarioj: valoraĵoj je dispono al ĉiu

La renoma retejo de ILEI, prizorgata de Jozefo Nemeth en Hungario. ĵus aperigis la dek plej universale interesajn seminariojn de la programo pri Aktivula Maturigo (AMO) de UEA kaj ILEI en kunlaboro. Jen la teksto, kiel ĝi aperas en la retejo:

Jen aliro al la naŭ plej utilaj AMO-seminarioj plus unu EKO-komuniko pri kunsido el Bulgario, kiu havis ĉiun trajton de AMO-seminario.

EKO 15 2014 Bulgario: kunveno en Sofio kun FLAM-analizo.

AMO 16 2015 Svislando: Tria Tutmonda Konferenco

AMO 84: Daŭripovaj fervojaj kondiĉoj (kunlabore kun IFEF)

AMO 86: Pacifikaj fabeloj el Nov-Zelando, Aŭstralio kaj *Tahiti*.

AMO 87: Baltio – kiel progresi? Analizo per FLAM-analizo.

AMO 87: FLAM-analizo (pri la balta regiono por seminario en Klaipeda, Litovio).

AMO 92: Kubo: senĉesa agado

AMO 93: Eŭrazia Ekonomia Komunumo (kunlabore kun IKEF)

AMO 94: Pri vortfarado en Eo, el kroata seminario.

AMO 103: Virinoj en la Eo-movado

## Pliaj artaĵoj el la 83-a hispana kongreso

Antonio Valén prezentas siajn lastajn du tradukitajn verkojn:
"Mil kretenoj" de Quim Monzó (el la kataluna lingvo), kaj
"Rekviemo por hispana kamparano" de Ramón J. Sender (el la kastilia lingvo),
https://youtu.be/tQEWCox4gIU

mga

## Studsemajnfinoj nun ankaŭ en Belgio

En februaro en Ipro (*Ypres-Ipres*), Belgio, okazis por la unua fojo BEST – Belga Esperanto-Studsemajnfino. Delonge tia kurso ne okazis en Belgio. Ĉeforganizis la semajnfinon Piet Glorieux kun helpo de interalie An Olijslagers, Kristin Tytgat kaj Nicky Janssen. Alex Humet helpis la komencintojn. Paweł Fischer-Kotowski per sia kurso celis tiujn, kiuj volas ekzerci sin pri parolkapablo. Lode Van De Velde helpis siajn kursanojn perfektigi sian lingvouzon en tri ŝtupoj: 1) korekti erarojn en tekstetoj; 2) traduki poezion, kaj 3) mem verki poezion kaj/aŭ mallongajn rakontojn. Mi venis ĉefe por inspiriĝi por mia propra instruado en Krikkenhaar, kie de multaj jaroj *Esperanto*

*Nederland* organizas studsemajnfinojn dufoje jare. Organizantoj de BEST anoncis, ke la kurso de Lode estis ideala por “instruistoj, tradukemuloj, verkemuloj kaj redaktoroj”. do mi unue planis ĉeesti tiun. Post iom da hezito, mi tamen elektis la kurson de Paweł, interalie ĉar tiel mi povis asisti mian koramikinon Jenny. Kvankam ŝi eklernis Esperanton en aŭgusto 2024, ŝi rapide progresis per Duolingo, kaj jam flue ekregis la bazon de la lingvo. Duolingo estas metodo, kiu funkcias ne por ĉiu, sed ĝi instigas ĉiutage okupiĝi pri la lernata lingvo. Aliĝi al nivelo 1 ne estintus por ŝi sufiĉe defie. Paweł efektive multe inspiris min! Do mi ĝojas, ke mi estis en lia kurso. Li ĉefe instruis pri afiksoj kaj akuzativo. Ni ankaŭ ludis la ludon *Tabuo*. La instruado estis malsimpla por Paweł, ĉar la lingva nivelo de la kursanoj variis. Li bone klarigis ĉion kaj donis trafajn ekzemplojn. Ĉefe gramatikon li bonege regas kaj sukcesis klarigi; Paweł regas la lingvon je denaska/universitata nivelo. Esperanto estas *pli facila* lingvo, tamen ne simpla. Eĉ mi mem pli profundigis mian lingvan konon; kelkaj ekzemploj de Paweł estis vere trafaj. Paweł alvokis viziti la libroservon, kiun prizorgis FEL. Pluraj kursanoj pro tio aĉetis librojn.

Al BEST venis ĉirkaŭ 35 homoj, kio estas bela rezulto. Ĝojigis min, ke ĉeestis sufiĉe multaj franclingvaj belgaj esperantistoj kaj eĉ kelkaj francaj. Du el tri el la instruistoj ne havis la nederlandan aŭ la francan kiel denaskan lingvon. Tio helpis por internaciigi la studsemajnfinon. Mi pensas, ke estus bone venontfoje havi kvar nivelojn. La grupo de Lode estis tre granda, kio iom malhelpis rapide progresi. Sed ĝenerale ĉiuj kontentis pri la semajnfino. Fotoj aperas en la Beneluksa Bitarkivo. Tie vi povas trovi ankaŭ la liston de la partoprenintoj kaj kelkajn pliajn informojn: https://benelukso.eu/best2025/




La organizantoj de BEST 2025 planas denove okazigi ĝin en 2026 eble en la franclingva parto de Belgio. Ni esperas, ke la studsemajnfino iĝos jara tradicio!

Yves Nevelsteen, ĉerpita kaj koncizigita el la nederlanda revuo *Fenikso*

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dudek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.